

SK-14/11

DANIEL QUARELLO

KOMPLEMENTOJ DE L' SUBSTANTIVO



Prepozicio.

*Komplementoj de l' substantivo.
Atributo de l' substantivo.
Substantivaj komplementoj.
Substantivaj komplementoj.*

*Komplementoj de l' verbo.
Libera akuzativo.*

QUARELLO & Cía.
Eldonistoj

Buenos Aires

0426

DANIEL QUARELLO

LERNU ESPERANTON



Predikato.

Akuzativo.

Transitivaj kaj neaktivaj verboj.

Atributo de l' verbo.

Konstruo.

Komuna dativo.

Aliaj klasoj de dativo.

Kazo dativo.

Kazo agantivo.

Aktiva voĉo kaj pasiva voĉo.

Mediala voĉo.

Deklinacio.

Prezo a frankite: \$ 1.- argentina mono aŭ 5 internaciaj respondkuponoj

LERNU ESPERANTON
II

DANIEL QUARELLO

KOMPLEMENTOJ
DE L'
SUBSTANTIVO



*La libro
kiu kreas majstrojn
je nia lingvo.*

1927
E
C
M

QUARELLO & Cía.
Eldonistoj

Casilla de Correo 47 (Suc. 13)
Buenos Aires

Ciuj rajtoj rezervitaj.
Todos los derechos reservados.


Laŭleĝe deponita.
Hecho el depósito legal.

Kopirajto de Daniel Quarello.
Bonaero, 1947.
Copyrighth by Daniel Quarello.
Buenos Aires, 1947.

*(Estas permesita la uzado de tiu ĉi verko
en lerneĵaj kursoj pri Esperanto. Sed estas
malpermesita ĝia uzado por korespondaj
kursoj, kaj ĝia adaptado, parta aŭ tuta, al
ia ajn alia lingvo.)*

Impreso en la Argentina

PRESITA EN ARGENTINIO



13

PREPOZICIO

Krom la kvar kazoj de l' deklinacio, en propozicio povas esti aliaj partoj nomataj komplementoj, kiuj precizigas la sencon de substantivo: *substantiva komplemento*, aŭ precizigas cirkonstancan de verbo: *verba komplemento*. Ĉi tiuj komplementoj estas enkondukataj de prepozicio.

La *prepozicio*, el la latina *prae* signifanta *antaŭ*, kaj *positio* signifanta *pozicion*, indikas ĝuste la pozicion, la funkcion de l' vorto enkondukata de ĝi en la esprimo.

En Esperanto la prepozicioj estas:

al
anstataŭ
antaŭ
apud
cis
ĉe
ĉirkaŭ
da
de
dum
ekster
el
en
ĝis
inter
je
kontraŭ
krom
kun
laŭ
malgraŭ

per
 po
 por
 post
 preter
 pri
 pro
 sen
 sub
 super
 sur
 tra
 trans

Inter la prepozicioj *apud* kaj *ĉe* estas la diferenco, ke *apud* indikas materian proksimecon, dum *ĉe* posedas pli vastan valoron kaj indikas ankaŭ rilaton:

Apud la domo de mia onklo mi ludas gaje.
Ĉe mia onklo mi loĝas komforte.

Inter la prepozicioj *cis* kaj *ĝis* estas la diferenco, ke *cis*, indikas simple maltrans, dum *ĝis* posedas valoron de etendiĝo kaj indikas ĝis kie atingas afero, spaco aŭ tempo:

La rivero fluas *cis* Alpoj. (Maltrans de Alpoj.)
 La rivero fluas *ĝis* Adriatiko. (Ĝi atingas Adriatikon.)

La prepozicio *cis*, ne oficiala, estis ĝis nun malmulte uzata, anstataŭ ĝi uziĝis la prepozicio *ĝis*, kies signifo ne estas la sama.

Inter la prepozicioj *por* kaj *pro* estas la diferenco, ke *por* indikas celon aŭ favoron, dum *pro* indikas kaŭzon aŭ motivaĵon:

Zamenhof oferis sian tutan vivon *por* Esperanto.
 Zamenhof devis peni longe *pro* malkompreno.

Inter la prepozicioj *super* kaj *sur* estas la diferenco, ke *super* indikas pozicion — sen kontakto, dum *sur* indikas pozicion — kun kontakto:

Super la tablo pendas lampo.
Sur la tablo kuŝas libro.

Inter la prepozicioj *tra* kaj *trans* estas la diferenco, ke *tra* indikas trairon — pasante sur, dum *trans* indikas je l'altra flanko — pasante super sen kontakto:

Ambaŭ marŝis *tra la longa malplena strato*.
Birdoj flugis *trans la maron*.

Sama prepozicio povas enkonduki pli ol unu klason de komplementoj, tial ne la prepozicio, sed la funkcio plenumata de vorto en la esprimo, la pozicio okupata de parolo en la deklinacio signas la respektivan komplementon.

* * *

Kiam la determina artikolo *la* estas antaŭata de prepozicio finiganta per vokalo, ĝi povas apostrofiĝi: *l'*.

Ses estas la prepozicioj post kiuj povas apostrofiĝi la artikolo. Ili estas:

ĉe *l'*, de *l'*, je *l'*, pri *l'*, pro *l'*, tra *l'*.

Tiam *l'* prononceiĝas kune kun la antaŭa prepozicio en unu sola silabo, kvankam ĝi skribiĝas ĉiam aparte.

Ekzemploj:

Cikado iris *al la formiko*. — Anstataŭ *ĉapelo* mi portis ĉapon. — Anstataŭ *porti ĉapelon* mi portis ĉapon. — Antaŭ *la domo* staras arbo. — Antaŭ *ol babili* vi pensu. — Apud *la propra domo* ŝtelisto ne ŝtelas. — Cis *la maro* estas vasta arbaro. — Ĉe *tablo malplena* babilo ne fluas. — Ŝi portas koralan kolieron *ĉirkaŭ la kolo*. — Tri metroj *da drapo* sufiĉas *por vira vesto*. — Tiu verkisto estas homo *de granda talento*. — Fleksu arbon *dum ĝia juneco*. — Mi staras *ekster la domo*, / kaj li estas *interne*. — Li prenis pinglon *el skatolo*. — En *printempo* ĉio floras. — Ilia kalkulo kreskis *ĝis kelkaj centoj / da frankoj*. — Mi restos ĉi tie *ĝis vidi lin*. — Oni povas troviĝi *inter martelo kaj amboso*. — Estas granda diferenco *inter kompreni lingvon kaj ĝin majstri skribe / kaj parole* (= Estas granda diferenco *inter kompreni lingvon kaj ĝin majstri parole*). — La abono finiĝas *je julio*. — Damasko donis komerce *al Tiro* grenon *kontraŭ armiloj*. — La pioniroj de novaj ideoj renkontas nenion *krom mokoj / kaj atakoj* (= La pioniroj de novaj ideoj renkontas nenion *krom atakoj*). — Oni devas observi siajn devojn *krom postuli siajn rajtojn*. — Kun *kiu* vi festas,

/tia vi estas. — *Laŭ la fruktoj* oni arbon ekkonas. — Ni promenis *malgraŭ la pluvo*. — Ne *per la pano* sole vivas la homo. — La komitato estas rebalotata *ĉiujare po triono*. — Li riskas *por la duba rezultato* kuraĝe sian vivon. — Ni havas ankoraŭ multon *por fari*. — *Post la kapitano* estas la leŭtenanto. — Li pasis *preter mi/sen saluto*. — *Prihavo najbara* oni estas malavara. — *Pro grava kaŭzo* mi devas tuj foriri. — Ne venas honoro *sen laboro*. — Li pasis *preter mi/sen saluti*. — Ekzistas nenio nova *sub la suno*. — La generalo estas *super la kolonelo*. — Li havas la kapon *sur ĝusta loko*. — *Tra unu orelo* ĝi eniras, / *tra l'dua* ĝi eliras. — *Trans la maro* estas alta montaro.

Se ni bezonas uzi prepozicion, / kaj la senco ne montras al ni, / kian prepozicion uzi, / tiam ni povas uzi la komunan prepozicion "je". Sed estas bone uzadi la vorton "je" kiel eble pli malofte.

KOMPLEMENTOJ DE L' SUBSTANTIVO

Inter la 4 kazoj de l' deklinacio kaj la komplementoj de l' substantivo estas la diferenco, ke la unuaj estas *regataj de l' verbo aŭ predikato* de l' propozicio, dum la duaj *determinas antaŭan substantivon*, kiu povas esti en nominativo, akuzativo, dativo, agantivo, aŭ esti predikata atributo.

La komplementoj de l' substantivo nomiĝas ankaŭ *genitivoj*.

ATRIBUTO DE L' SUBSTANTIVO

“Ekzemple, — diras Benot — la vorto:

ĉevalo

povas uziĝi por montri ĉiun ĉevalon de l'mondo. Sed la esprimo:

araba ĉevalo

jam ekskluzivas ĉiujn aliajn ĉevalojn, kiuj ne estas de tiu raso. Kaj

nigra, araba ĉevalo

povas nomiĝi tiel nur kelkaj ĉevaloj posedantaj la du kvalitojn kune.
Fine:

tiu nigra, araba ĉevalo.

ĉi tiu nigra, araba ĉevalo.

la nigra, araba ĉevalo.

estas la propra nomo de unu individuo el la animala regno.”

La adjektivoj *nigra, araba* kvalifikas la nomon *ĉevalo*, kaj la pronomo *tiu* aŭ *ĉi tiu* aŭ la artikolo *la* determinas la nomon *ĉevalo*, tial ili estas *atributoj de l' substantivo*.

Ĉi tiu klaso de atributoj distingiĝas dis de l'atributo de l' verbo aŭ atributo de l'predikato, kiu taŭgas por kompletigi la signifon de predikato, kiel en la ekzemploj:

La infano *estas sana*.

La infano *ŝajnas esti sana*.

Estus superflue signi la genron de l'adjektivo, tial en Esperanto oni ne diras:

amikina knabino.

sed:

amika knabino.

Esepte de l'artikolo *la* kaj la proksimiga adverbo *ĉi*, substantiva atributo akordiĝas laŭ nombro al la determinata nomo:

Ĉarmaj buboj estas ili.

Sed, kiam atributo karakterizas du aŭ pli da substantivoj samtempe, el kiuj ĉiu substantivo estas singulara, same ilia atributo devas esti plurala:

Mi havas freŝajn panon/kaj vinon.
Mi havas fidelajn amikon / kaj kolegon.

Se oni dirus:

Mi havas freŝan panon / kaj vinon.

aŭ:

Mi havas panon / kaj vinon freŝan.

signifus, ke nur la pano aŭ nur la vino estas freŝa. Same, se oni dirus:

Mi havas fidelan amikon / kaj kolegon.

aŭ:

Mi havas amikon / kaj kolegon fidelan.

kompreniĝus, ke oni parolas pri ununura amiko-kolego.

Kontraŭe, kiam pluraj atributoj karakterizas pluralan substantivon, sed ĉiu atributo koncernas nur unu el la konceptoj esprimataj de l'substantivo, tiam ĉiuj atributoj devas esti singularaj:

La malnova / kaj nova Testamentoj.
(= La malnova Testamento + la nova Testamento.)

Aera, / tera / kaj mara trafikoj.
(= Aera trafiko + tera trafiko + mara trafiko.)

Substantiva atributo akordiĝas ankaŭ laŭ kazo al la kvalifikata substantivo:

Vi havas konfuzajn ideojn.

Sed, kiam atributo ne esprimas iun kvaliton jam konatan, nome daŭran de l'kvalifikata nomo, sed nur ian kvaliton aldonan, provizoran, okazan, tiam la atributo de substantivo en akuzativo ne ricevas la *-n* finaĵan:

Mi trovis tiun vinon bona.
(= Mi trovis, / *ke* tiu vino estas bona.)

Antaŭe mi ne sciis, ke tiu vino estas bona, sed mi konstatis tion.

Li pentris la grizan muron flava.
(= Li pentris la grizan muron tiel, / *ke* nun ĝi estas flava.)

Antaŭe la muro estis griza, kaj li pentris ĝin flava.
La atributoj *bona, flava* nomiĝas *klarigaj komplementoj*.

Se oni aldonus la signon de l'akuzativo al la adjektivoj *bona, flava* la signifo de l'respektivaj propozicioj ŝanĝus plenplene:

Mi trovis tiun vinon bonan.
(= Mi trovis *tiun vinon*, / *kiu* estas bona.)

En la supra okazo la propozicio montras, ke mi — kiu jam sciis, ke la vino estas bona — ne sciis kie ĝi staris.

Li pentris la grizan muron flavan.
(= Li pentris *la muron*, / *kiu* estis griza-flava.)

La muro estis griza-flava, kaj li pentris ĝin en alian koloron.

Ekzemploj:

Mi trovis la botelon rompita (= Mi ne sciis, / *ke* la botelo estis rompita). — Mi trovis la botelon rompitan (= Mi sciis, / *ke* la botelo estis rompita). — Johano trovis tiun personon lerta (= Johano trovis, / *ke* tiu persono estas lerta). — Johano trovis tiun personon lertan (= Johano trovis *tiun personon*, / *kiu* estas lerta). — Si havis la veston bela (= Si havis, / *ke* ŝia vesto estis bela). — Si havis la veston belan (= Si havis *la veston*, / *kiu* estas bela). — Ili juĝis la knabon

senkulpa (= Ili juĝis, / *ke* la knabo estas senkulpa). — Ili juĝis la knabon senkulpan (= Ili juĝis *la knabon*, / *kiu* estas senkulpa). — Oni desegnis la arbon granda (= Oni desegnis la arbon tiel, / *ke* ĝi estas granda). — Oni desegnis la arbon grandan (= Oni desegnis *la arbon*, / *kiu* estas granda). — Lasu min libera (= Lasu, / *ke* mi estu libera). — Mi ne povas lasi ŝin sola (= Mi ne povas lasi, / *ke* ŝi restu sola). — Lasu la hundon trankvila (= Lasu, / *ke* la hundo restu trankvila). — Lasu la hundon trankvilan (= Lasu *la hundon*, / *kiu* estas trankvila).

15

SUBSTANTIVAJ KOMPLEMENTOJ

Ni jam scias, ke atributo de substantivo kvalifikas aŭ determinas nomon aŭ vorton uzatan kiel nomon, kiel en la ekzemploj:

Kvalifikaj atributoj.

<i>araba</i> ĉevalo	(adjektivoj)
<i>ĉarmanta</i> virino	(aktivaj participoj).
<i>vundita</i> viro	(pasivaj participoj).

Determinaj atributoj.

<i>la</i> kamarado	(difina artikolo).
<i>mia</i> kajero	(posedaj pronomoj kunmetataj).
<i>ties</i> agoj	(posedaj pronomoj korelativaj).
<i>tiu</i> krajono	(montraj pronomoj).
<i>kiu</i> kordo	(rilataj kaj demandaj pronomoj).
<i>ĉiu</i> vulpo	(kolektivaj pronomoj).
<i>iu</i> fraŭlo	(nedifinitaj pronomoj).
<i>neniu</i> helpanto	(neaj pronomoj).
<i>unu</i> gramatiko	} (fundamentaj numeraloj).
<i>la unu</i> gramatiko	
<i>la unua</i> monato	(ordaj numeraloj).
<i>la duobla</i> sumo	(multoblaj numeraloj).
<i>la kvinona</i> parto	(nombroaj aŭ frakciaj numeraloj).
<i>la unuopa</i> klopodo	(kolektivaj numeraloj).

Kaj nun ni konas alian specon de komplementoj de l'substantivo formataj de prepozicio kune kun substantivo, kiu kune determinas

antaŭan nomon. Tial, devas ĉeesti ĉiam du substantivoj, la unua *specifata* kaj la dua *specifanta*. Ĉi lasta estas enkondukata de prepozicio:

Atributa komplemento.

La atributa komplemento kvalifikas nomon. Ĝi ne havas la formon, tamen jes la valoron de adjektivo.

La fundamento *de Esperanto* (= la *Esperanta* fundamento).

La prezo *de l'pano* (= la *pana* prezo).

Sukceso *de entrepreno* (= *entreprena* sukceso).

La konkludo *de l'parolado* (= la *parolada* konkludo).

La kongreso *de Moskvo* (= *moskva* kongreso).

La fruktoj *de l'ĝardeno*.

La ministro akeptis la postenon *de prezidanto* (= la *prezidanta* postenon).

Traktato *de paco* (= *paca* traktato).

Lia atesto *de kapableco* (= lia *kapableca* atesto).

Profesoro *de gramatiko* (= *gramatika* profesoro).

La ministoj donis multajn pruvojn *de sia kuraĝo*
(= multajn *kuraĝajn* pruvojn).

Traktato *pri paco* (= *pripaca* traktato).

Lia atesto *pri kapableco* (= lia *kapableca* atesto).

Profesoro *pri gramatiko* (= *gramatika* profesoro).

La ministoj donis multajn pruvojn *pri sia kuraĝo*
(= multajn *prikuraĝajn* pruvojn).

Kvalifika komplemento.

La kvalifika komplemento indikas moralan aŭ materialan kvaliton de nomo:

Homo *de talento* (= *talenta* homo).

Viro *de admirinda pacienco* (= *admirinda pacienco* viro).

La ĉevalo *de blanka koloro* (= la *blankkolora* ĉevalo).

Tablo *de ronda formo* (= *rondforma* tablo).

Bestoj *de sama speco* (= *samspecaj* bestoj).

Tio estas afero *de duba karaktero* (= *dubkarakter* afero).

Li aĉetis nur librojn *de sama valoro* (= *samvalora* librojn).

Cervo *kun bonaj lumboj* (= *bonlumba* cervo).

Vazo *kun arĝenta garnituro* (= *arĝentgarnitura* vazo).

Vorto dirita en ĝusta tempo estas kiel oraj pomoj *kun argentaj ŝeloj* (= *argentselaj pomoj*).

Poseda komplemento.

La poseda komplemento indikas posedon aŭ apartenon:

La genio *de Zamenhof* (= la *zamenhova* genio).

La kajero *de Petro* (= la *petra* kajero).

La dometo *de kamparano* (= la *kamparana* dometo).

La ringo *de l'fianĉino* (= la *fianĉina* ringo).

Li estas la fiero *de sia patro* (= lia *patra* fiero).

Maria legas la libron *de sia frato* (= lian *fratan* libron).

De kiu estas tiu trumpeto?

Materia komplemento.

La materia komplemento indikas la materion aŭ materialon el kiu konsistas io:

Pneŭmatiko *el kaŭĉuko* (= *kaŭĉuka* pneŭmatiko).

Statuo *el marmoro* (= *marmora* statuo).

La mantelo *el veluro* (= la *velura* mantelo).

Domo *el brikoj* (= *brika* domo).

Manĝo *el kreskaĵo* (= *kreskaĵa* manĝo).

Tegmento *el verdaj folioj* (= *verdfolia* tegmento).

Nia urbo havas pasintecon *el gloro* (= *gloran* pasintecon).

Nia ĝojo estis kovrata de malhela vualo *el malgajeco* (= *malgajeca* vualo).

Apartiga komplemento.

La apartiga komplemento indikas la tuton de l'parto koncernata de specifata substantivo:

Unu *el ili*.

Vortoj *el la "Fundamento"*.

Rakonto *el interesa romano*.

Niaj kolegoj *el la oficejo*.

Tio estas la lastaĵo *el nia havo*.

Ŝi perdis la klientaron *el la altaj sferoj*.

El du elektu la malpli grandan malbonaĵon.

Komplemento de nedeterminita kvanto.

La komplemento de nedeterminita kvanto indikas vorton specifanta

substantivon, kiu esprimas en preciza aŭ nepreciza maniero kvanton, nombron, mezuron, pezon, k. t. p., k. t. p.:

Donu al mi glason *da vino*.
 Li aĉetis dekduon *da pomoj*.
 La malsanulo perdis dek jarojn *da vivo*.
 Ŝi havas mil lirojn *da rento*.
 Ili faris du tagojn *da vojaĝo*.
 Oni prenis tri metrojn *da drapo*.
 Tiu ĉi urbo havas milionon *da loĝantoj*.
 Mi uzis tiom *da blanka papero*.
 Kiom *da mono* vi volas?
 Oferu al ili iom *da kafo*.
 Li havas neniom *da persona ambicio*.
 Li havas nenion *da persona ambicio*.
 Mi deziras trinki pli *da biero*.
 Mi deziras trinki pli *da forta biero*.
 Ŝi portis multe *da lano*.
 Ŝi portis multon *da lano*.
 Permesu diri al vi kelke *da vortoj*.

Antaŭ pronomo persona, poseda, montra aŭ kolektiva, kaj antaŭ nomo determinata de l'artikolo, kaj antaŭ nombro neniam uziĝas *da*.

Kiel ni vidos en la sekvanta komplemento, en ĉi tiu okazo la prepozicio estas *de*.

Komplemento de determinita kvanto.

La komplemento de determinita kvanto indikas vorton specifanta substantivon, kiu esprimas en preciza aŭ nepreciza maniero kvanton, nombron, mezuron, pezon, k. t. p., k. t. p.:

Donu al mi glason *de tiu vino*.
 Li aĉetis dekduon *de l' pomoj*.
 La malsanulo perdis dek jarojn *de sia vivo*.
 Ŝi havas renton *de mil liroj*.
 Ili faris vojaĝon *de du tagoj*.
 Oni prenis tri metrojn *de l' drapo*, / kiun aĉetis vi.
 Ĉi tiu urbo havas loĝantaron *de unu miliono*.
 Mi uzis tiom *de l' blanka papero*.
 Kiom *de via mono* vi volas?
 Oferu al ili iom *de l' kafo*.
 Li havas neniom *de lia persona ambicio*.

Li havas nenion *de lia persona ambicio.*
 Mi deziras trinki pli *de tiu biero.*
 Mi deziras trinki pli *de tiu forta biero.*
 Si portis multe *de sia lano.*
 Si portis multon *de sia lano.*

Notu ke:

Donu al mi glason *da vino.*

signifas, ke oni petas tiom *da vino*, kiom enhavas glaso.

Donu al mi glason *de l' vino.*
 Donu al mi glason *de tiu vino.*

signifas, ke oni petas kvanton *de difinita vino.*

Donu al mi glason *de vino.*

signifas, ke oni petas glason speciale uzatan por trinki vinon. En ĉi lasta ekzemplo *de vino* ne estas komplemento de kvanto, sed atributa.

Ekzemploj:

Multaj esperantistoj diras, /ke oni devas uzi nur la prepozicion *de* post la vortoj, /kiuj estas en la subaj ekzemploj. — Aro *de kamparanoj* laboris sur la herbejo. — Grupo *de viroj* veturis sur ĉaro. — Taĉmento *de soldatoj* marŝis sur la vojo. — Amaso *de cigno*j naĝis sur la lageto. — Bando *de birdoj* nestis sur la arbo. — Serio *de statuoj* kuŝis sur la monteto. — Vico *de azenoj* staris sur la ebenaĵo. — Sutita sur la pavimo estas tavolo *de fojno*. — Ne estas eĉ unu domo sur spaco *de kelkaj kilometroj*. — Nubo *de vaporo* ŝvebas sur la ĉielo. — La formiko gardas provizon *de nutraĵoj* sub la tero. — Nia lingvo kalkulas grandan nombron *de majstraj verkoj*. — Vi posedas sufiĉan dozon *de prudento* por kompreni. — Ŝia ringo havas valoron *de ducent sterlingoj*. — Vi havas multajn hipotekojn sur via domo. — La manko de Esperanto ĉiam sentiĝis akre en la internaciaj rilatoj.

“Da” post ia vorto montras, /ke tiu ĉi vorto havas signifon de mezuro. — Zamenhof diris en siaj “Lingvaj Respondoj”: /“La vorto ‘da’, kiu enhavas kaŝite la sencon de *ia*, /montras, /ke ni parolas pri *kvanto da ia aĵo*, /sed ne pri ĝia individueco. — Ekzemple: /iom *da viando* = iom *da ia viando*”. — Glaso *de vino* estas glaso, /en kiu

antaŭe sin trovis vino, / aŭ kiun oni uzas por vino. — Glaso *da vino* estas glaso plena je vino. — Kiom *da ĵaroj* vi havas? — Li portis botelon *da likvoro*. — Si aĉetis du litrojn *da lakto*. — Ili manĝis duonkilon *da bovaĵo*. — *Da ĉevaloj* ili havas 236. — Sur la arbo sin trovis multe (aŭ multo) *da birdoj*. — Multaj birdoj flugas en la arbaro. — Inter “multe da” / aŭ “multo da” / kaj “multaj” estas la diferenco, / ke “multe da” / aŭ “multo da” signifas: / “multaj kune (ĉiuj kune)”, / dum “multaj” signifas: / “multaj dise (ĉiu aparte)”. — En la ĉambro sidis nur kelke *da homoj*. — Kelkaj homoj sentas sin la plej feliĉaj, / kiam ili vidas la suferojn de siaj najbaroj. — Inter “kelke da” / kaj “kelkaj” estas la diferenco, / ke “kelke da” signifas: / “kelkaj kune (ĉiuj kune)”, / dum “kelkaj” signifas: / “kelkaj dise (ĉiu aparte)”.

Post vortoj kun la sufikso “on” oni neniam uzas la prepozicion “da”, / sed oni devas uzi nur la prepozicion “de” aŭ “el”. — La duonon *de l'karbo* bruligu. / kaj la alian duonon gardu por morgaŭ. — La du trionoj *de naŭ* estas ses. — Tri kvaronoj *el la mono* gardu en la domo. — Pro tio multaj esperantistoj diras, / ke same okazas post la vortoj “peco”, / “parto”, / “sekcio”, / kaj “frakcio” / aŭ “partumo”. — Portu pecon *de kuko* al la knaboj. — Januaro estas parto *de ĵaro*. — Ŝi portis multe *el sia lano*. — Ŝi portis multon *el sia lano*. — La finaĵoj, / prefiksoj / kaj sufiksoj de Esperanto estas memstaraj vortoj, / kiuj konservas ĉiam egalan signifon.

16

SUBSTANTIVAJ KOMPLEMENTOJ

Subjektiva komplemento.

La subjektiva komplemento indikas personon, animalon aŭ aferon, kiu plenumas la agon esprimatan de specifata vorto; ĉi tiu estas substantivo derivata de verba radikoj:

La instruo *de l' apostoloj* (= la *apostoloj* instruis al la mondo).

La konkero *de l' romanoj* (= la *romanoj* konkeris la antikvan mondon).

La akcepto *de l' delegitoj* (= la *delegitoj* akceptis la urbestron).

La konstruo *de l' arkitekto* (= la *arkitekto* konstruigas ponton).

- La konsento *de l' patrino* (=la *patrino* konsentas pri tio).
 La amo *de l' gepatroj* (=la *gepatroj* amas siajn filojn).
 Oni observis la decidon *de l' direktoro* (=la *direktoro* decidis).
 Raŝlo *de azeno* (= *azeno* raŝlas).
 La trilo *de birdo* estas delikata kanto (= *birdo* trilas).
 Odoro *de floro* (= *floro* odoras).
 Lumo *de kandelo* (= *kandelo* lumas).
 Fajfado *de lokomotivo* estas akra sono (= *lokomotivo* fajfas).

Se la senco de l'esprimo estas malklara, oni povas uzi: *fare de* aŭ *ige de* aŭ *age de* anstataŭ *de*. Ekzemploj:

- La konkero de l' antikva mondo *fare de l' romanoj*.
 La konkero de l' antikva mondo *ige de l' romanoj*.
 La konkero de l' antikva mondo *age de l' romanoj*.

Objektiva komplemento

La objektiva komplemento indikas personon, animalon aŭ aferon, kiu ricevas aŭ suferas la agon esprimatan de specifata vorto; ĉi tiu estas substantivo derivata de verba radiko:

- La instruo *de l' apostoloj* (=la *apostoloj* estis instruitaj de Jesuo).
 La konkero *de l' romanoj* (=la *romanoj* estis konkeritaj de l'barbaroj).
 La akcepto *de l' delegitoj* (=la *delegitoj* estis akceptitaj de l'urbestro).
 La konstruo *de ponto* (= *ponto* estas konstruigata de l'arkitekto).
 La preparo *de l' kongreso* (=la *kongreso* estas preparita).
 Prezento *de nova teatraĵo* (=nova *teatraĵo* estas prezentata).
 La bombardado *de l' haveno* devigis la malamikojn cedi (=la *haveno* estis bombardita).
 Bato *de azeno* (= *azeno* estas batata).
 Mortigo *de birdo* estas kruela faro (= *birdo* estas mortigita).
 Ŝiro *de floro* (= *floro* estas ŝirata).
 Rompo *de kandelingo* (= *kandelingo* estas rompita).
 La detruo *de lokomotivo* estis grava akcidento (= *lokomotivo* estis detruita).

Se la senco de l'esprino estas malklara, oni povas uzi: *al* aŭ *je* anstataŭ *de*. Ekzemploj:

La bombardado de l'eskadro *al la haveno* devigis la malamikojn cedi.

La bombardado de l'eskadro *je l'haveno* devigis la malamikojn cedi.

Inter la komplementoj subjektiva kaj objektiva estas la diferenco, ke la unua indikas la faranton, dum la dua indikas la ricevanton de tio esprimata de specifata substantivo.

Kiam la du komplementoj staras kune en propozicio, estas oportune ŝanĝi la propozicion de unu el ili, kiel oni montras supre, por doni pli da klareco al la parolado.

Apozicio.

La apozicio estas substantivo, kiu plenumas la funkcion de komplemento de alia substantivo antaŭmetata kaj en rilato kun tiu ĉi per senpera apudesto:

sinjoro *Vilhelmo Markoni*.

doktoro *Zamenhof*.

fraŭlino *Berta*.

profesoro *Benot*.

la pia sankta *Johano*.

la fervora beata *Angelika*.

la fama filozofo *Sokrato*.

nia amata poeto *Graboski*.

la strato *Sopeno*.

la preĝejo *Sankta Klara*.

la teatro *Verdi*.

la muzeo *Lionardo*.

la instituto *Benot*.

la konfitejo *Sejno*.

la restoracio *Kairo*.

la hotelo "*La Blanka Ĉevaleto*".

la stadiono *Olimpia*.

En Esperanto la nomoj de *urbo, regiono, lando, maro, rivero, monto, tago, monato, sezono, festo* estas apozicioj, se ili estas antaŭataj de komuna nomo:

la urbo *Romo*.
 la insuloj *Malvinaj*.
 la kontinento *Eŭropo*.
 la maro *Mediteraneo*.
 la rivero *Danubo*.
 la altaj montoj *Alpoj*.
 la proksima tago *ĵaŭdo*.
 la mallonga monato *februaro*.
 la milda sezono *printempo*.
 la glora festo *Pasko*.

Neniam apozicio prenas la -n finaĵan, eĉ kiam la vorto specifata, kies komplemento ĝi estas, sidas en akuzativo:

La admirantoj vizitis sinjoron Vilhelmo Markoni.
 La tuta mondo devas danki doktoron Zamenhof.
 La advokato gratulis fraŭlinon Berta.
 Gete vizitis la eternan urbon Romo en la jaro 1786a.
 Bugenvil estis la unua, / kiu koloniis la insulojn Malvinaj.
 Ĉiuj devas lerni la neŭtralan lingvon Esperanto.

Infinitivo, kiu estas nomo de ago kaj plenumas en propozicio la funkcion de substantivo, povas troviĝi ankaŭ en apozicio.

Kiam la esprimo postulas, infinitivo transitiva en apozicio povas regi akuzativon:

la arto *verki*.
 la tasko *fari*.
 la ordono *iri*.
 la rajto *preni*.
 la ideo *diri*.
 La literaturo estas arto *krei* belon per lingvo.
 Esperanto posedas la kapablon *esprimi* ĉiujn plej delikatajn nuancojn de l' penso.
 Mi havas povon *krucumi* vin, kaj povon *liberigi* vin.

Esplika esprimo.

La esplika esprimo estas gramatika formo, kiu esplikas antaŭan substantivon. Ĝi konsistas el unu aŭ pluraj vortoj, kaj troviĝas inter du komoj aŭ inter du paŭzoj de l'parolado:

Zamenhof, *la iniciatinto de Esperanto*, naskiĝis en la jaro 1859a.

Romo, *la eterna urbo*, estis vizitata de Gete en la jaro 1786a.

Malvinaj, *la sudaj insuloj argentinaj*, estis unue koloniitaj de Bugenvil.

Ĉiam en Mediteraneo, "*la maro via*" de *l'romanoj*, disvolviĝis la grandaj bataloj decidaj por la civilizo.

La suno, *reĝo de l'ĉielo*, aperis subite.

Romulo, *fondinto de Romo*, estis ĝia unua reĝo.

Printempo, *la sezono de l'floroj*, estas la plej bela / kaj agrabla.

Italio, *la bela lando*, estas la ĝardeno de Eŭropo.

Ankaŭ la esplika esprimo sidas en akuzativo, kiam la substantivo specifata troviĝas en tiu kazo:

Parolante Esperanton, / ni honoras Zamenhof'n, ĝian iniciatinton.

En 1786a Gete vizitis Romon, la eternan urbon.

Bugenvil estis la unua, / kiu koloniis Malvinajn, la sudajn insulojn argentinajn.

Ĉiuj devas lerni Esperanton, la neŭtralan lingvon.

La romanaj legioj konkeris Grekion, la landon de l'antikva kulturo.

Ni vizitis Karlon, nian amikon.

Vokativa komplemento

La vokativa komplemento estas gramatika formo, kiu reprezentas personon aŭ animalon, aferon aŭ ideon, kiun oni vokas. Ĝi konsistas el substantivo, kun aŭ sen komplementoj, kaj troviĝas inter du komoj aŭ inter du paŭzoj de l'parlado:

Ne, / vi eraras, *sinjoro*, / via pano estas malpli freŝa / ol mia.

Mi deziras al vi bonan tagon, *Karlo*.

Knabo, vi estas neĝentila.

Amikoj, vi ne estas komplezaj.

Mia hundo, vi estas tre fidela.

Vokativa komplemento rilatas ĉiam kun la dua persono de l' verbo, ankaŭ kiam la pronomo specifata estas subkomprenata:

Sidiĝu, *sinjorino* (= *Vi sidiĝu, sinjorino*).

Eksidu, *sinjoro* (= *Vi eksidu, sinjoro*).

Infano, ne tuŝu la spegulon (= *Vi, infano, ne tuŝu...*).

Karaj infanoj, estu ĉiam honestaj (= *Vi, karaj infanoj, estu...*).

Fraŭlino Anna, kompleze gubernu la bubon (= *Vi, fraŭlino Anna...*).

Goju, *ŝipoj de l' maro*, / ĉar via gloro estas konsekrita (= *Goju vi, ŝipoj de l' maro...*).

Iufoje vokativa komplemento havas subkomprenata ne nur la pronomon specifatan, sed ankaŭ la tutan propozicion, kies parto ĝi estas. Tiel:

De kio tio ĉi venas, / *mia filino?*

Sinjoro, / *mia patrino forpelis min el la domo.*

Nun kion mi devas atendi, / *mia sinjoro?*

Estas evidente, ke la vokativaj komplementoj *mia filino*, *sinjoro*, *mia sinjoro* apartenas respektive al propozicio subkomprenata kiel la sekvanta:

De kio tio ĉi venas, / *mi demandas al vi, mia filino?*

Mi devas klarigi al *vi, sinjoro*: / *mia patrino forpelis min el la domo.*

Nun kion mi devas atendi, / *mi petas al vi, mia sinjoro?*

Vokativa komplemento estas sintakse sendependa de l' aliaj partoj de propozicio kaj sendeklina en kazo:

Ni atendas *vin*, Savinto de l' mondo.

Mi gratulas *vin*, moŝtino mia.

Ĉiuj fidas *vin*, fidela helpanto.

Nomiga komplemento.

En Esperanto nomoj de loko estas apozicioj kiel: *la urbo Ateno*, *la sankta urbo Mekko*, *la libera ŝtato Irlando*, sed kiam ia loko ne distingiĝas per geografia nomo propra, sed per nomo, kiu karakterizas tiun lokon, tiam formiĝas nomiga komplemento enkondukata de l' propozicio *de* aŭ *el*:

La urbo de l' Vatikano (= La vatikana urbo).
 Mi deziras vidi la regionojn el Francio.
 Mattiaso vojaĝis en urbon de Judio.
 Korsiko estas montoza insulo el Mediteraneo.
 La rivero de Egiptio (= Egipta rivero).
 La distrikto de l' maro (= La mara distrikto).
 La ĉirkaŭaĵoj de l' urbo.
 La insularo de l' Verda Kabo.
 La Urbo de l' Kabo.

la strato de l' nordo.
 la preĝejo de l' kruco.
 la teatro de l' opero.
 la muzeo de arto.
 la instituto de Esperanto.
 la konfitejo de l' gaso.
 la restoracio de l' tri palmoj.
 la hotelo de l' lago.
 la stadiono de l' olimpiado.

Iufoje la vorto specifata de substantiva komplemento povas esti subkomprenata kiel en la ekzemplo:

Perfekteco estas de Dio.

kie estas subkomprenata la specifata substantivo *kvalito*, ĉar la plena propozicio estas:

Perfekteco estas kvalito de Dio.

KOMPLEMENTOJ DE L' VERBO

Inter la 4 kazoj de l'deklinacio kaj la komplementoj de l' verbo estas la diferenco, ke la unuaj estas *regataj de l' verbo aŭ predikato* de l' propozicio, dum la duaj estas liberaj je ajn rilato kaj *indikas la cirkonstancojn ĉe kiuj disvolviĝas la objekto de l' verbo.*

La komplementoj de l' verbo nomiĝas ankaŭ *ablativoj.*

LIBERA AKUZATIVO

Ni jam scias, ke adverbo modifas verbon kiel en la ekzemploj:

Bonaj infanoj lernas *diligente*.
 La entuziasmo daŭris *nelonge*.
 La novaĵo *rapide* diskoniĝis.
 Lia parolo fluas *dolĉe* / kaj *agrable*.
 Oni *ne* devas *severe* ekzameni ĉion.
 Du homoj povas *pli multe* fari, / ol unu.
 Li *tute ne* estas vengema.
 Venu al mi *hodiaŭ* / *vespere*.
 Mi *ne* faris *skribe* la kontrakton, / sed *parole*.
 Ili plenumis *kiom nur eble rapide* sian taskon.
Bone pensi / kaj *bone* agi sufiĉas por vivi *bone* / kaj *feliĉe*.

Ankaŭ povas formiĝi adverboj kunmetitaj kiel ekzemple:

La trupo alvenis *ĝustatempe* (= je ĝusta tempo).
 La infano manĝis *ĝissate* (= ĝis sato).
 Mi amas vin *tutkore* (= el tuta koro).
Surstrate (= sur strato) paŝetas aro de junulinoj.
 Li tradukis la romanon *senmanke* (= sen manko).
 La lignisto fendis la trunkon *laŭlonge* (= laŭ ĝia longo).
Vidalvide (= kun vido al vido) sur la alia bordo etendiĝas
 ĉarma arbetaro.

Kaj nun ni konos alian specon de komplementoj de l' verbo formataj de prepozicio kune kun substantivo, kiuj kune modifas verbon. La verbaj komplementoj *indikas la cirkonstancojn ĉe kiuj disvolviĝas la objekto de verbo*. Ĉi tiuj cirkonstancoj specifas manieron, tempon, lokon, mezuron, kaŭzon, komparon, rimedon aŭ ilon, argumenton, kunecon, k. t. p. Ekzemple:

Oni laboras *dum la nokto*.

La komplemento specifikas, ke la objekto de l' verbo *laboras* disvolviĝas dum la tempo indikata *dum la nokto*.

La verbaj komplementoj estas de multaj klasoj kaj ili prenas sian nomon de l' funkcio plenumata en prepozicio.

Tamen atentu, ke sama prepozicio povas enkonduki komplementojn de malsamaj klasoj, pro tio estus eraro juĝi la funkcion de ia komplemento per la prepozicio, kiu enkondukas ĝin.

Verbaj komplementoj povas transformiĝi en adverbojn, ŝanĝante nek sian funkcion, nek sian valoron. Tial, la supra ekzemplo povas transformiĝi en:

Oni laboras *nokte* (= dum nokto).

Libera akuzativo.

Krom la gramatika akuzativo, nome la akuzativo regata de transitiva verbo kiel en:

Kapuĉo monakon ne faras.

estas en Esperanto la libera akuzativo, nome iu komplemento de l' verbo, kiu specifikas la subajn cirkonstancojn:

1^a maniero.

2^a difinita tempo.

3^a daŭrotempo.

4^a direktakuzativo.

5^a mezuro (kvanto, longo, larĝo, alto, profundo, distanco, pezo, prezo, valoro, k. t. p.).

Maniero.

La komplemento de maniero indikas kiel plenumiĝas la objekto de verbo:

La du amikinoj promenas *manon en mano*.

Paŝon post paŝo ni atingos la celon.

Brakon sub brako la paro haltis je l' balustrado.

La du malamikoj renkontiĝis *vizaĝon kontraŭ vizaĝo*.

La gimnastikistoj formis kordonon *flankon ĉe flanko*.

Ĉi tie efektive ĉeestas du komplementoj de l' verbo: unu formata kun libera akuzativo kaj alia formata kun prepozicio:

manon / *en* mano.
 paŝon / *post* paŝo.
 brakon / *sub* brako.
 vizaĝon / *kontraŭ* vizaĝo.
 flankon / *ĉe* flanko.

Tiaj komplementoj povas formiĝi ankaŭ kun du adverboj kaj unu prepozicio, kiel ekzemple:

Iom post iom ni atingos la celon.
 La formo nova *iom post iom* elpuŝos la formon malnovan.

Transformante sin en adverbojn, ĉi komplementoj ŝanĝas nek sian funkcion, nek sian valoron:

La du amikinoj promenas *mane en mane*.
Paŝpostpaŝe ni atingos la celon.
Brak-sub-brake la paro haltis je l' balustrado.
 La du malamikoj renkontiĝis *vizaĝe kontraŭ vizaĝe*.
 La gimnastikistoj formis kordonon *flanke ĉe flanke*.
*Iompostio*me ni atingos la celon.
 La formo nova *iom-post-iom* elpuŝos la formon malnovan.

Pro tio povas uziĝi ankaŭ la simpla formo:

mano en mano.
 paŝo post paŝo.
 brako sub brako.
 vizaĝo kontraŭ vizaĝo.
 flanko ĉe flanko.

sen libera akuzativo kaj la tuta esprimo estas konsiderata kiel kunmetita adverbo:

La du amikinoj promenas *mano en mano*.
Paŝo post paŝo ni atingos la celon.
Brako sub brako la paro haltis je l' balustrado.
 La du malamikoj renkontiĝis *vizaĝo kontraŭ vizaĝo*.
 La gimnastikistoj formis kordonon *flanko ĉe flanko*.

Alia klaso de komplemento de maniero estas la jena:

Li parolis *la ĉapelon sur la kapo*.

Ili pendigis la kanajlon *la kapon malsupren*.

Centoj de niaj samideanoj, fidelaj al sia ŝtata devo, falis *la armilojn en la mano*.

Ĉi tiuj komplementoj povas formiĝi ankaŭ kun prepozicio anstataŭ libera akuzativo:

Li parolis *kun la ĉapelo sur la kapo*.

Ili pendigis la kanajlon *kun la kapo malsupren*.

Centoj de niaj samideanoj, fidelaj al sia ŝtata devo, falis *kun la armiloj en la mano*.

Difinita tempo.

La komplemento de difinita tempo indikas kiam plenumiĝas la objekto de verbo:

Mi foriros *sabaton / aŭ dimanĉon*.

Zamenhof naskiĝis *la dek kvinan* de decembro de l' jaro 1859a.

Zamenhof naskiĝis *la 15an* de decembro de l' jaro 1859a.

Ian mantanon ili alvenos neatendite.

La lastan aŭtunon li multe studadis, / kaj faris la ekzamenon.

Kvankam jaro estas indikata per orda numeralo, tamen estas ofta la uzo de fundamenta numeralo en la parolado:

Zamenhof naskiĝis *la dek kvinan* de decembro *de 1859-*.

Esperanto aperis publike *en 1887-*.

La unua universala kongreso de Esperanto okazis *en 1905-*.

Ankaŭ dato, precipe en leteroj kaj titoloj, estas indikata ofte per fundamenta numeralo kaj sen libera akuzativo:

15. decembro 1859.

15. XII. 1859.

7. 7. 1905.

Daŭrotempo.

La komplemento de daŭrotempo indikas kiom daŭras la objekto de verbo:

Mi restis *du horojn*.
 Ŝi malsanis *ok tagojn*.
 La lernanto studadis *kvin jarojn*.
 La tutan nokton li sentis kapdoloron.

Direktakuzativo.

Ĉiuj idiomoj rafinitaj distingas nete la movon aŭ iron *en ia loko* dis de l' movo aŭ iro *al ia loko*. Tial Esperanto distingas la duan komplementon per libera akuzativo aldonata al substantivoj, adjektivoj, pronomoj kaj adverboj, krom la ĝusta prepozicio:

La infano kuras *en la korto*.

signifas, ke la infano jam estis en la korto kaj kuras en ĝi. Sed kun libera akuzativo:

La infano kuras *en la korton*.

signifas, ke la infano ne estis antaŭe en la korto kaj ke nun li kuras en ĝin (de ekstere la infano kuras internen de l' korto).

Tiel:

Li kuris *antaŭ ŝi* (= Li jam kuris antaŭ ŝi / kaj daŭris kurl antaŭe).

Li kuris *antaŭ ŝin* (= Li estis post ŝi / kaj kuris antaŭen).

La hundeto kuris *post la bebo* (= La hundeto kuris post la bebo, / kaj restis poste).

La hundeto kuris *post la bebon* (= La hundeto kuris post la bebon por atingi lin).

Kie vi estas? — Mi estas *en la domo*. — Mi estas *dome*.

Kien vi iras? — Mi iras *en la domon*. — Mi iras *domen*.

Povas uziĝi ankaŭ direktakuzativo sen prepozicio, kiam la komplemento de loko estas geografia nomo:

Mi vojaĝis .. *Hispanion*.

kaj kiam oni volas doni pli da emfazo al la parolado:

Iru tuj .. *vian ĉambron*.

Direktakuzativo uziĝas ankaŭ en figura senco, kiel ekzemple:

Benoj fluis *sur la landon*.

En sian longan rigardon li metis karesan promeson.

Ĉi tio povas influĝi *sur la sukceson* de nia afero.

La esploristo etendis sian rigardon *malproksimen*.

Mezuro.

La komplemento de mezuro indikas la kvanton, longon, larĝon, alton, profundon, distanceton, pezon, prezon, valoron, k. t. p. de l' objekto de verbo:

La tablo estas longa *du metrojn* / kaj *dek centimetrojn*.

La strato estas larĝa *dudek metrojn*.

La turo estas alta *cent metrojn*.

Ĉi tiu foso estas *tri metrojn* / kaj *duonon* profunda.

Via domo estas *du kilometrojn* malproksime de l' mia.

La pakaĵo pezas *kvar hektogramojn*.

La ĉambro kostas *dek pesojn*.

Sia ringo valoras *grandan monsumon*.

Ankaŭ iterativo, kiu indikas kiomfoje ripetiĝas la objekto de verbo, formiĝas kun libera akuzativo aldonata al la vorto:

foje

Ekzemploj:

Mi parolis kun ŝi nur *unu fojon*.

La junulino legis la libron *du fojojn*.

Ni vidis tiun operon *kvar fojojn*.

Lia patro konversaciis kun lia instruisto *multajn fojojn*.

Esperantina kantas *la lastan fojon*.

Transformite en adverbojn, la iterativoj formas unu solan vorton

kune kun la numeralo aŭ adjektivo, kiu ilin akompanas, kaj kiel adverboj ne prenas la *-n* de l' libera akuzativo:

Mi parolis kun ŝi nur *unufoje*.
La junulino legis la libron *dufoje*.
Ni vidis tiun operon *kvarfoje*.
Lia patro konversaciis kun lia instruisto *multfoje*.
Esperantina kantas *lastfoje*.

Kun la verbo *esti* ĉi tiuj komplementoj transformiĝas en predikatan atributon kaj neniam prenas akuzativon. Tiel:

Estis sabato aŭ *dimanĉo*, / kiam li foriris.
La daŭro de ŝia malsano *estis ok tagoj*.
La longo de l' tablo *estas du metroj* / kaj *dek centimetroj*.
La pezo de l' pakaĵo *estis kvar hektogramoj*.
Tiam *estis la lasta fojo*, / ke Esperantina kantis.

Se terminó de imprimir el día
quince de diciembre de mil
novecientos cuarenta y ocho en
los talleres gráficos de la Com-
pañía Impresora Argentina,
S.A., Alsina 2049-Buenos Aires.

Tiu ĉi libro finpresigis je la
dek kvina de decembro de mil
naŭcent kvardek oka ĉe Com-
pañía Impresora Argentina,
S. A., Str. Alsina 2049-Bonaero.

A. LOPEZ LUNA

Z A M E N H O F

INICIADOR DEL ESPERANTO

La unua biografio pri la majstro en hispana lingvo.

Prezo afrankite: \$ 5.- argentina mono aŭ 25 inter. respondkuponoj

DANIEL QUARELLO

Breve Historia del Esperanto



Modela varbobroŝuro 32-paĝa
en hispana lingvo.



S. A. T.

SENNACIECA ASOCIO
TUTMONDA

La Esperanto-laborista mond-organizo
(Kleriga, eduka, kultura)

67, AVENUO GAMBETTA — PARIZO 20

VENDOPREZO: \$ 1.— argentina mono aŭ 5 internaciaj respondkuponoj